

EFIKOJ DE ELEKTROMAGNETA IMPULSO ATOMBOMBA

verkita la 25an de novembro 2024 de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr)

Iu sub la nomo *Avic* verkis en la retejo *reseauinternational.net* (internacia reto, en pluraj lingvoj) je la 22a de septembro 2024 tre interesan artikolon pri la efikoj de elektromagneta impulso generita per eksplodo de atombombo ekster nia atmosfero.

<https://reseauinternational.net/une-attaque-emp-sur-les-reseaux-electriques-et-les-infrastructures-nationales-critiques-des-etats-unis/>

Jen eventuala scenaro apokalipsa pour Usono, kiu ĝis nun ne protektis sian elektroductan reton kontraŭ tia atako :

Dum ŝtormo en vintre malvarma nokto, kvar atombomboj sinsekve eksplodas ekster la tera atmosfero super la usonaj urbegoj Dallaso, LasVegaso, Kolombuso kaj la golfo de Jukatano. Homoj vidas grandan lumon en la ĉielo sed sentas nek bruon nek blovon nek brulon de tiuj eksplodoj. Sed ili estigas potencegajn ondojn elektromagnetajn, kiuj tuj detruas ĉiujn funkciajn sistemojn elektronikajn kaj elektrajn.

Tio signifas ke ne plu estos por longa tempo ĉio necesa al nia moderna vivo. Ne plus funkcios elektronikaj aparatoj por komunikado kaj regulado. Ne plu funkcios elektraj aparatoj por prilumi, movigi, varmigi, malvarmigi, kuraci kaj pompi aŭ cirkuligi likvaĵojn, pro fizika detruo de la elektroducta reto. Sekve energiaj produktoj kaj uzinoj ĉesos funkcii, ankaŭ mankos benzino por transporti homojn kaj varojn. Ĉio haltos kaj okazos tuja ĥaoso kun baldaŭaj amasribeloj !

Por tion okazigi, necesas nur unu submara militŝipo, kiu desub la maro en la Meksika golfo ekflugigas balistikajn misilojn. La kelkminute mallonga tempodaŭro de ilia alflugo tute malebligas al usonaj defendoj kontraŭmisilaj ilian detruon antaŭ ilia eksplodo.

La harmonia ekvilibro kaj bona funkciado de nia ege kompleksa civilizo nepre postulas pacon, konkordon kaj kunlaboradon. Nur frenezuloj pretas militi per atomarmiloj !